

BULTENO DE Malaga Esperanto Grupo

# La Cenaĉero

nº 1 JANUARO 1984

## NOVA JARO, NOVA REVUO

Kaj novaj esperoj, iluzioj kaj deziroj labori por la disvastigado de Esperanto ĉiunivele.

Kvankam samtitolita, ni ŝanĝis iomete la formon kaj enhavon de nia revuo, kiun ni deziras aperigi kiel eble plej ofte, se ne monate, almenaŭ dumonate, ĉar ni devas ankaŭ kunlabori en la verkado kaj proksima aperigo de la revuo "Andaluzio" kiu unuavice estos ellaborita de la Grupoj de Kordovo, Seviljo kaj ni mem.

Ni deziras komenci la jaron kaj ĉi tiun revuon farante etan omaĝon al tiom da esperantistoj por kiuj ilia idealo estas eterna kaj ĉiam estas pretaj servi. Tiucele, ni elektis ĉi tiun poemeton pri la servo, de la hinda poeto R.Tagore.

> "Mi dormis...
> kaj sonĝis ke la vivo estas ĝojo.
>
> Mi vekiĝis,
> kaj vidis ke la vivo estas servo.
>
> Mi servis,
> kaj vidis ke la servo estas ĝojo".

Ĉe la sojlo de la jaro 1984, ni sendas novjarajn bonde-

# NIA GRUPO

La pasintajn 15an, 16an kaj 17an de decembro, la espera tistaro de Malago celebris la datrevenon de Zamenhof. Seminario, Generala Kunveno, Ekspozicio de libroj, revuoj, turistaj broŝuroj, esperantaĵoj, ktp. Je la fino ni tostis por Esperanto.

Andrés Martín, s-ano de nia Grupo, gvidos mezan kurson por la gelernantoj kiuj jam sukcesis la elementalan. Ĝi komencos la 13-an de januaro kaj okazos ĉiu vendred Per ĝi oni ne nur praktikos la lingvon, sed ankaŭ lernos pri la historio kaj movado de Esperanto.

Ceteraj gelernantoj de la elementala kurso ĉeestos tri tagojn semajne (mardon, ĵaŭdon kaj vendredon) gvidataj de s-ano Julio Herrero.

Ekde la 16-a de januaro, nia s-ano Enrique Hurtado de Mendoza gvidos elementalan kurson en la Priprofesia Lernejo kie li studas, dum ses monatoj, ĉiutage je la posttagmezo.

Nia Grupo, kune kun Seviljo kaj Kordovo, studas nun la statutojn kaj necesajn paŝojn por la fondigo de la Andaluza Federacio.

Amase ni intencas ĉeesti la venontajn renkontiĝojn, t.e. Tendaro, Nacia kaj Andaluza Kongresoj.

Ĉu vi scias bone kion celas ILEI? Bonvolu tralegi la ILEI-an paĝojn en ĉi tiu revuo. Regule aperos informoj kiuj sciigos al vi la ĝisdatajn novaĵojn.

Ene de la programeroj por la "Kultura Semajno" aranĝita de la G.F.U., la 18-an de januaro, en la Kulturdomo, okazos Pridiskuta Kunsido pri la temo "Esperanto en la Lernejo". Partoprenos FETE-UGT, Asocio de Gepatroj de Gelernantoj, SATE kaj Hispana Sekciestro de ILEI.

Rilate al la disvastigo de Esperanto en Andaluzio, nia Grupo aranĝis perkorespondan kurson kiu estas uzita de lernantoj en Granada kaj Almeria.

Okaze de la nova sidejo de ILEI Hispana Sekcio, ni pet de kelkaj instancoj subvenciojn. Ŝajne, kaj dank' al s-ano Vicente Ramirez, kiu oficas en Malaga Ŝparkaso, oni donos al ILEI monhelpon.

Ĝis!

# LA MOVADO

ESPERANTO
La internacia lingvo
DIE INTERNATIONALE SPRACHE FÜR ALLE

- Se SKOLTA MOVADO interesas vin, legu la lastan paĝon de la junia n-ro de "Revuo SEJO".

- La Organizaĵo "HUMANISTA INTERNACIO" sendas senpage inf. pri siaj celado kaj statuto. Ili bezonas delegitojn en ĉiuj urbo kaj vilaĝo. Apartado 313, Terrasa.

- Laŭ enketo fare de Georgo Kamaĉo, el Madrido, al 65 eminentaj esperantistoj, la 10 plej belaj Esperantaj vortoj estas jenaj: AMO - AMIKO - ESPERO - ESPERANTO - BELA - LABORO - PACO - LAZURA - SOPIRI kaj PATRINO.

- Granda kampanjo por enkonduki Esperanton EN AFRIKON lanĉis UEA lastatempe.

- KUIRU kun Pilar: En "Heleco" vi trovos manieron prepari kelkajn pladojn. Ĉinajn pladojn oni povas lerni kuiri dank al "E.P.Ĉ".

- La 52-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazos en Tirrenia (Pisa) de la 21-a ĝis la 30-a de junio 1.984.

- De la 31-a de majo ĝis la 3-a de junio 1.984 okazos en Villafranca del Panadés, konferenco pri esperantologio.

- MEMORU: La plej bona propagando por nia lingvo estas: paroli la lingvon. Kaj la plej efika malpropagando estas: paroli ĝin malbone antaŭ la ne-esperantista publiko.

ATENTU: Tre baldaŭ aperos "ANDALUZIO" la revuo de la andaluzoj por si, por Hispanio kaj la Homaro. Eldonita de la Grupoj de Kordovo, Malago kaj Seviljo.

- ŜAKO: ade aperas ŝakrubriko en "Heroldo de Esperanto". Ek al solvo!

**ĈI TIUJN NOVAĴOJN NI LEGIS POR VI DISDE ALIAJ REVUOJ**

- - - - - - - - - - - - - - -

ESPERANTO

## ĈIAM, LA CETERAJ

Por ebligi al ĉiuj gesamideanoj koni kaj kontakti la Organizon ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instrui-toj) kaj por havigi startan bazon por aranĝi la ekzameno[j]n al kiu rilatas la 3-a punkto de la Agadplano de ILEI por la anta lernojaro, ni aperigas ĉi tiun artikolon kun la plej bonaj deziroj por ĉiuj.

Esperanto disvastiĝos pli kaj pli se ni instruas ĝin. Senĉese ni revas pri la enkonduko de nia lingvo en la Lernejo. Tamen, ĉar la oficialaj instancoj ne ŝatas poli-tike ebla la instruon de Zamenhofa Lingvo en la Instruaj Centroj, ni devas studi, konsideri, aliajn rimedojn por ke Esperanto eniru en la lernejojn. Mi opinias ke Asocioj de Gepataroj de Gelernantoj, emaj al plenumado de neler-nejaj taskoj (oficiale ankoraŭ), povas helpi nin en la enkonduko de Esperanto en la Kolegioj. Tial, mi petas de vi ĉiuj kontaktu respondeculojn de tiaj organizoj por pro-fiti la ŝancon kiun ili, tute certe, havigos al ni.

Bonvolu kuraĝi kaj kredi ke la sukceso estas pli prok-sima ol antaŭe, ol neniam. La venonta Esperanto-Jubileo de 1987 estas unu el la plej gravaj okazoj por montri, kaj konvinki, al mondo la gravecon de Esperanto. NI PRA-VAS, gesamideanoj, kaj tial ni ĉiam laŭtparolu favore al Esperanto. Profitu ĉiujn momentojn por disvastigi nian lingvon.

Memvideblas ke kuracisto ne kuracos malsanulon pri kiu nenion konas. Plie, gravaj entrepenoj bezonas seriozan konsideron de la celoj, rimedoj kaj cirkonstancoj kiuj havigos aŭ malhelpos la sukceson. Tial, necesas respondi enketon, demandaron, ktp. Neniam forgesu tion! Ĉu vi plenskribis jam la enketon aperintan en la antaŭa n-ro de "Cenaĉero"?

Aliflanke memoru ke ĉiam eblas partopreni efike. Ne estas necese havi multe da mono, sufiĉas kuraĝo. Se ni ne povas vojaĝi, korespondu. La letera amikeco ofte estas unu el la plej gravaj ŝancoj por praktiki la lingvon kaj stimuli ceterajn, pleje hodiaŭ kiam la ekonomia krizo ne faciligas la vojaĝojn kaj restadon en aliaj urboj ol la propra.

Fine, geamikoj, enskribu vin en la Meza Kurso kiun havigas al ĉiuj la Organizo ILEI tra la Esperanto-Grupo de Malago. Kapabligu vin mem por lernigi Esperanton al aliaj! Kredu min, la plezuro helpi al ceteraj, instruante la Internacian Lingvon al ili estas unu el la plej gravaj travivaĵoj de ĉiu esperantisto. Do, ek al la tasko!

## AGADPLANO DE HISPANA SEKCIO DE ILEI
(lernojaro 1.983-84)

1) Okazigo de seminario pri pedagogio.

2) Enkonduko de Esperanto en la lernejoj tra Asocioj de Gepatroj de Gelernantoj.

3) Okazigo de Ekzamenoj de Perfektiga Kurso. La gelernantoj devos pruvi sian kapablecon per flua parolado kaj bazaj konoj pri Literaturo kaj Historio de la Movado.

4) Gesamideanoj pretaj studi por kaplabiĝi kiel Profesoroj de estonta Hispana Supera Esperanto-Lernejo kontaktu kun la Estraro de la Sekcio.

5) Ekde la monato Januaro oni eldonos bultenon de nia Hispana Sekcio. Estas necese, ke la samideanoj pretaj helpi ĉi-cele sendu al Hispana Sekciestro siajn sugestojn kaj opiniojn.

6) La Delegitoj informu al la Estraro de la Sekcio pri siaj agadprogramoj plenumotaj dum ĉi tiu lernojaro,ktp.

7) En la unua numero de la menciita bulteno oni informos pri la amplekso de la temoj pri Literaturo kaj Historio postulotaj en la Perfektiga Kurso.

8) Ĉiu ILEI-ano devas varbi minimume unu novan anon dum la anta lernojaro.

9) M^1 petegas por Esperanto, ke vi ĉiuj partoprenu efike, Sendu, do, viajn proponojn, parolu pri ĉi ILEI-aj celoj faru iom, bonvole. Kio ajn estas preferinda al la silento.

Elkorajn salutojn!

La Hispana Sekciestro

ĈU vi jam vidis la novajn poŝtkartojn kaj afiŝojn?
Mendu ilin ĉe Callosa de Segura!

# LETEROJ AL LA DIREKTORO

Kara leganto: Estas via vico! Jen la paĝo por esprim vian opinion pri tiu ĉi revuo aŭ pri iu ajn temo. Ni ate das viajn letron, poŝtkarton, ktp.

Listo da revuoj, bultenoj, kiuj regule alvenas al ni:

| | |
|---|---|
| - Heroldo de Esperanto | - Heleco |
| - El Popola Ĉinio | - SEJO |
| - Bulgara Esperantisto | - La Kordova Esperantisto |
| - Esperanto | - Fido kaj Espero |
| - Kontakto | - Sulko |
| - PACO | - Internacia Pedagogia Revuo |
| - Antón Balagué | - Barcelona Esperanto-Centro |
| - Monato | - Vegetara Esperantisto |
| - Boletín de HEF | - Kulturaj kajeroj |
| - HEJS-JUneco | - Sennaciulo |
| - Koncize | - Oomoto |
| - Valencia Luno | - Eldonaĵoj de MEM |

Salutpoŝtkartoj ricevitaj lasttempe:

- Uli Ender (Germanio)
- Mercedes León (Granada)
- Madrida Esperanto Junularo (Madrid)
- Grupo I.B. Séneca (Córdoba)

Sciigoj pri radioelsendoj ricevitaj dum decembro:

- Radio Vaticana Programmes (12)
- Esperanto-Redakcio de ORF (Aŭstrio)
- Radio Pekino (ankaŭ sendis kalendaron, flagetojn, insi nojn)
- Svisa Radio Internacia.
- Radio Polonia.

NOTO: Se mi forgesis iun el la revuoj ricevitaj, mi peta pardonon, ĉar mi faris ĉi tiun liston parkere, t.e ne rigardante nian bibliotekon.

-.-..-.-.-.-.-.-.-.-.-.

# HEJS Paĝo

1959 25 1984
HEJS
JUBILEA TENDARO
KORDOVO-PASKE 1984

Mi multfoje aŭdis kaj legis en diversaj revuoj ke la junularo reprezentas la daŭrigon kaj estontecon de la Movado, precipe pro sia juneco. Sed tio ne estas titolo kiun oni donas ĉar oni estas juna, sed rilatas al io kion oni devas atingi de tago en tago, de jaro en jaro.

Miaopinie, la hispanaj gejunuloj, ĉu apartenantaj al HEJS, aŭ laborantaj ene de E-Grupo, aŭ eĉ kiel izolitaj, sufiĉe pruvas ke ili meritas tiun reprezentadon, pro diversaj bonaj ecoj, sed precipe, pro la laboremo kaj kapableco.

Tiuj kiuj kutimas ĉeesti la kongreson povas rimarki tian laboremon, ĉu en la aranĝado, en la diskutadoj de la ĉefaj temoj aŭ en la prezentado de alternativoj al tio kio, laŭ ili, ne estas sufiĉe bona.

Pri la kapableco por ariĝi, organizi kunvenojn kaj disvastigi Esperanton, vi persone povos konstati ĝin ĉeestante la Tendaron kiu, ĉijare, okazos en Kordovo post tri monatoj, t.e. dum la Sankta Semajno.

La organizantoj de Literaraj Konkursoj bone konas iliajn kapablecon kaj lertecon, ĉar tre ofte, inter la unuaj premiitaj troviĝas gejunuloj. Por ĉi tiu jaro ili mem organizos sian propran literaran konkurson, ĉu por la Tendara aŭ Nacikongresa Renkontiĝoj; sed pri ĉi tio vi aŭdos kaj legos en venontaj monatoj, ĉar ankoraŭ ĝi troviĝas en studado.

Fine, mi deziras sciigi al ĉiuj gejunuloj kaj al HEJS mem ke en nia revuo ili disponas je unu paĝo por esprimi sin aŭ rakonti pri siaj agadoj.

Se vi, kara leganto, deziras aliĝi aŭ ricevi informojn pri HEJS, vi povas skribi rekte al la sidejo en Madrido, strato Atocha, 98 4º aŭ al la delegito en Malago, s-ano Rafael López Castilla, strato: Corregidor Francisco Molina

# 2-a ANDALUZA KONGRESO



(Malago 17, 18, 19 Augusto 1984)

PROVIZORA PROGRAMO (Rilate al laborkunsidoj)

1) Informoj de ĉiu Grupo pri la agadoj, inter la unua kaj dua kongresoj, por la disvastigo de Esperanto en Andaluzio.

(Kiel decidite en Kordovo, ĉiu Grupo zorgos pri la disvastigo de Esperanto kaj laŭebla helpo por fondi Esperanto-Grupojn en unu aŭ du pli proksimaj provincoj.)

2) Diskuto pri la informoj de la unua punkto.

3) Informoj de la komisionanoj pri la disvolviĝo de la statutprojekto por la Andaluza Asocio/Federacio.

(Konsiderante ĝian gravecon, oni elektis komisionon kiu pristudos la statutojn kaj aktivecojn de la estonta Andaluza Asocio aŭ Federacio.)

4) Diskuto pri la informoj de la tria punkto.

5) Informoj de la organizantoj de nia komuna Revuo aŭ Bulteno "Andaluzio" pri ĝia disvolviĝo.

6) Malfermita punkto por iuj ajn temoj.

(Ni daŭrigos la pritraktotajn temojn)

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

KROME de laborkunsidoj ni oferos al la kongresanoj diversajn aranĝojn:

- Teatraĵojn en esperanto.
- Teatraĵojn en hispana lingvo, pri andaluzaj aferoj.
- Viziton al la strato Esperanto.
- Ni disponos senpagan dormejon por almenaŭ 25 personoj.
- Post la tagmanĝo kaj ĝis la komenco de vesperaj laborkunsidoj, la kongresanoj kiuj deziros, povos reiri al la kongresejo por aŭskulti esperantajn kantojn.
- Je 15 minutoj piede, estas la plaĝo "Antonio Martín"
- Apud la kongresejo situas la preĝejo "Stella Maris".

- - - - - - - - - - - -

# Kunlaborajoj

(Cristina López, de nia Grupo)

## LA GAMETOJ KAJ LA FEKUNDIGO

La virseksaj gametoj: etaj kaj rapidaj!

La testikoj de la bestoj fabrikadas la virseksajn gametojn: la spermatozoojn. Ĉi tiuj estas ĝenerale insertitaj en likvo nomita spermo. La spermatozooj estas etaj maldikaj ĉeloj kaj havas malmultajn nutrajn rezervojn kaj ĝenerale, ili estas tre moviĝemaj. Ili translokiĝas tre rapide per rapidaj movoj de ia vipumo kiu plilongigas ilin: la flagelo. Ekzistas eksceptaj kazoj inter la bestoj ĉe kiuj la spermatozooj ne havas flagelon, restas senmovaj kaj posedas hokojn, kiel okazas al la omaroj kaj al kelkaj miriapodoj.

La dimensioj de la spermatozooj estas tre variaj: de kelkaj mikronoj ĝis la plej granda kiu mezuras proksimume unu milimetron. Kurioze, la naturo ŝajne donis al si la malican plezuron ekipi per la plej malgranda spermatozooj la plej grandajn bestojn, kaj inverse. La spermatozoo de la hamstro (unu kvarono de milimetro) estas sesoble pli longa ol tiu de la baleno, kiu tamen estas ducentoble pli longa ol la hamstro. Sed etega krostulo posedas la plej impresan rekodon, ĉar ĝia spermatozoo - la plej granda el la besta mondo - estas pli longa ol la besto mem. Ĝi ne havas lokon en la korpo de la besto se ĝi ne fleksiĝas ĉirkaŭ si mem kaj pro tio la etega krostulo havas grandan protuberancon ĉe sia dorso.

La spermo enhavas, ĝenerale, grandan nombron da spermatozooj: Plejmultokaze ĉiu guto enhavas milionojn au, eĉ, dekojn da milionoj. La spermatozooj naĝas abunde, kunpremitaj, skuante sin multe kaj, kiam oni rigardas ilin per mikroskopo, ili videblas moviĝantaj senĉese.

La inaj gametoj: pli grandaj kaj senmovaj.

La ovarioj de la inoj formas la inajn gametojn, nomitajn ovolojn. Tiuj ĉi ovoloj similas la malon de la spermatozooj ili estas ĉiam senmovaj, ĝenerale rondaj kaj riĉaj je nutraj rezervoj. Ilia grando kaj aspekto varias lau la abundo de ĉi rezervoj. La plej grandaj ovoloj troviĝas ĉe la birdoj kaj la rampuloj, tio estas ĉe la grupoj kies ovoj demetiĝas antaŭ sia disvolviĝo.

daŭrigas...

La ovolo de la kokino estas la "flavaĵo" de la ovoj kiujn ni manĝas, ĝi plenas de nutraj rezervoj kaj estas ĉirkaŭita de aliaj rezervoj kiuj formas la ovolblankaĵon formitan en la genera aparato de la kokino, la kokido havas nur tiun ĉi ovoflavon kaj tiun ĉi ovoblankon por manĝi antaŭ ol ĝi eloviĝas. La ovoflavo de la struto, kiu ampleksas sufiĉe da centimetroj por la diametro, estas samtempe la plej granda ovolo kaj la plej granda besta ĉelo konata nuntempe. La ovoloj de la mamuloj enhavas sufiĉe malpli da rezervoj ĉar la embrio estas nutrata per la sanga fluo de la ino kiu portas ĝin. La ovolo de la virino,ekzemple, ne ampleksas pli ol unu dekono de milimetro por la diametro.

(daŭrigota)

---

## S C I I G O J

---

- Antaŭ du monatoj, pli malpli, divenulino en Barcelono aŭguris ke en la Kristnaska Loterio, la unua premio estos la numero 11524. Ŝi divenis ankaŭ ke ĉi tiun numeron oni vendas nur en Malago, en Administrejo. Ĉi ti estas tute certa. Sed la unua premio ne estis la jam nomita kaj nur la kvara estas la plej simila: la numer 11342.
  Oni povas konstati ke la divenulino ne estis tute koncentrita!

- Baldaŭ Malago havos novan radiostacion. Ni parolas pri "Universitata Radio". Estas unu el la radiostacioj kiujn subvencias la Andaluza Hunto. Oni establos ĝin en "El Ejido" kaj ĝi komencos dissendi en la monato Januaro per frekvenco modulata. Ĉi tiu radiostacio estos ne nur por studentoj, tamen en ĝi aperos nek politiko nek anoncoj.

Sciigis Rafaelo.

---

Denove, nia samideano Rikardo Albert forveturis al Madrido, ĉi-foje por longa tempo. Ni revidos lin dum la Tendaro en Kordovo.

---

# Granda Frateco Universala

## SEMANA CULTURAL

en homenaje al Dr. Serge Raynaud de la Ferrière

Málaga, 16 al 21 de Enero de 1984

Organizada por la

## GRAN FRATERNIDAD UNIVERSAL


(Fundación Dr. Serge Raynaud de la Ferrière)

en colaboración con el

VICERRECTORADO DE EXTENSION
UNIVERSITARIA

CASA DE LA CULTURA

# AMUZAĴOJ



Soldato frapas je la pordo
de la kapitano:
- ĉu vi donas vian permeson?
- Jes!
- do, ĝis la venonta monato!

---------------

Mi promesas al vi ke, depost
mia elekto kiel Prezidanto,
neniu el vi enlitiĝos sen antaŭ
esti manĝinta!
- sinjoro, mi ankoraŭ ne manĝis.
- do, vi ankoraŭ ne enlitiĝu!

---------------

- Paĉjo, tiu arbo, kio estas?
- ĝi estas arbo, filo.
- Ha, kaj tiu domo? kio ĝi estas?
- ĝi estas domo, etulo.
- karulo, ne ĝenu vian patron per tiom da
demandoj! diris la patrino.
- Ne, permesu lin instruiĝi, diris la patro.

---------------

- Paĉjo, donu al mi 5 pesetojn.
- ĉu kvar pesetojn, filo? Por kio vi volas tri
pesetojn se kun du vi havas sufiĉe. Nu, jen
unu, la duono por mi kaj la cetera por via frato.

---------------

Ministerio deziras koni la kulturnivelon de la popolo. Ti
cele delegito pri kulturo vizitas lernejon. La instruisto
diras: La lernantaro estas tre kapabla, vi rajtas demandi in
ajn.
- Vi, infano, kiu skribis (x) "Don Kiĥoto-n"?
- Mi ne, sinjoro.!
- Kiel vi ne?
- Ne, sinjoro, vere mi ne estis!
- Sed... ĉu vi aŭskultas, instruisto?
- Jes, kaj mi devas diri ke ĉi tiu estas bona infano kaj
li diras ke li ne estis, certe ke li ne faris ĝin.

La delegito tute surprizita foriras la lernejon kaj en
tas ĉion al la urbestro. Ĉi tiu respondas: Okazas ke la
instruisto estas amiko de la patro de tiu infano, sed p-
kaŭ tute certe ke la infano skribis ĝin.

La komisianto, tute nervoza, metas siajn manojn sur l
kapon kaj ...